

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



**EKO 2023 / 41. Julio 14 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alk. PDF 49 KB Sume: 479 MB**

**temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipu koneblaj.**

## Instruista trejnado - ĉiam grava bezono

Jen kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, <Edukado.net> kaj ILEI denove kune **organizas unujaran instruistan trejnadon**, kiu disponigas la necesajn kondiĉojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando de la 9-a ĝis la 15-a de septembro, 2023. UAM estas la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando en kies Interlingvistika Fako okazos la kursaro.

La sekvaj sesioj okazos rete: du semajnfinaĵ renkontiĝoj en 2023, 4-taga sesio en februaro 2024 kun aldona ekzameno, kaj denove du semajnfinaĵ sesioj printempe de 2024. Inter la retaj sesioj la partoprenantoj laboros hejme pri la ricevitaĵ taskoj, uzante ankaŭ la retejon de Edukado.net kaj konsultiĝos kun la kursgvidantoj.

Por fini la studojn necesos pretigi finlaboraĵojn pri metodika temo, kies prezento kun la fina kompleksa (teoria kaj praktika) ekzameno okazos en septembro



2024. Aliĝantoj ricevos movadan diplomon pri instruista trejnado. La trejnado estas specialiĝo de la 3-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj, kio signifas, ke temas pri la plej altnivela instruista trejnado, kun teoria bazo kaj praktiko.

**Kondiĉoj:** bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno bonvenas) kaj kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado.

**Partoprenkotizo:** A-landoj: 300 EUR, B-landoj 150 EUR por unu semestro. Por pliaj informoj kontaktu: [interlin\(ĉe\)amu.edu.pl](mailto:interlin(ĉe)amu.edu.pl). **Limdato: aŭgusto 15, 2023.**

Elŝuteblaj informiloj kaj reklamiloj troveblas ĉi tie: <https://edukado.net/trejnado>

## AMO 101 okazos en Latvio

Tio okazos en la 18-a de julio, ekde 14,00 CEST (UTC 12.00) kun la temo: 'Pli dinamika medio por baltaj esperantistoj'. La prezentaĵo de SMG estas delonge dissendita, ni aldonas nove faritan ege sveltigitan alkroĉaĵon. La aliro estas:

<https://us02web.zoom.us/j/89765966141>

**Kunsid-identigilo: 897 6596 6141; Pasvorto: esperanto**

## AMO 102 okazos en Lignano Sabbadioro

Tio okazos en la 11-a de aŭgusto ekde 14.30 CEST (12.30 UTC) kun temo: 'Interkulturo en Lernejoj'. Kontribuo de SMG estas preparata. Intervenos estraranoj de ILEI; estos muzika interludo.

## Kandidatiĝu por aperigo de artikolo en prestiĝa revuo

'Ni kredas, ke venis la tempo retaksi la komunikajn rimedojn por interpretado kaj tradukado kaj en la kompreno de lingvoj kaj tekstoj, por retaksi la viv-manieron en nia 'globigita' mondo. Ni invitas aŭtorojn verki pri tio, cele al aperigo en prestiĝa hispana eldonaĵo. La invito estas organizita kunlabore de Íkala, *Revista de Lenguaje y Cultura*, kaj de la Uneska instanco pri Lingvo-politiko kaj Multlingvismo (UCLPM), haviganta la avantaĝon de la fakto, ke *Universidad de Antioquia* ekmembriĝis en UCLPM en 2022. UCLPM estas esplora reto bazita en la Federacia Universitato de Santa Catarina (UFSC), en Santa Catarina (UFSC), en kiu 31 universitatoj en 17 landoj el kvar kontinentoj uzas 11 lingvojn. Ĝi esploras la rilatojn inter multlingvismo kaj diversajn aspektojn de la 17 Daŭripovaj Evoluigaj Celoj.

### Postuloj kaj kalendaro por Proponoj

- Ne pli ol 400 vortoj, inkluzive de bibliografiaj notoj.
- Enhavu la titolon, institucion, retpoŝtan adreson kaj aŭtornomo(j)n.
- Estu verkita en la hispana, angla, franca aŭ portugala.
- Deklaru la elektitan kategorion kaj terenon.
- Enhavu detalan resumon pri la enhavo de la artikolo kun referencoj.

Proponoj alvenu ekde nun ĝis:	Septembro 25, 2023 al <a href="mailto:revistaikala@udea.edu.co">revistaikala@udea.edu.co</a>
Deklaro pri akcepto aŭ la malo	October 16, 2023
Livero de la plena artikolo	Januaro 31, 2024
Kolega prijuĝo	Januaro 31 ĝis Majo 15, 2024
Teknikaj preparoj	Majo 16, 2024 ĝis aŭgusto 31, 2024
Publikigo	Septembro, 2024

Por demandoj pri enhavo kaj formatigo de la spaciala eldono: [revistaikala@udea.edu.co](mailto:revistaikala@udea.edu.co)

## La junularaj sekcioj de TEJO decidas, kiu plej aktivas

La Konkurso 'Elstaraj Sekcioj de la Jaro' de TEJO estas ĉiujara konkurso organizata de Komisiono pri Landa kaj Faka Agado (LFA) kiu celas instigi landajn kaj fakajn junularajn organizojn al aktiva agado en diversaj agadkampoj kaj samtempe rekoni la atingojn kaj laborojn de junularaj esperantistaj organizoj tra la mondo.



Rajtas partopreni en la konkurso ĉiu ekzistanta landa aŭ junulara organizo, ĉu aliĝinta al TEJO aŭ ne, kun aparta invito al novaj aŭ malgrandaj sekcioj de TEJO kaj al junularaj organizoj, kiuj esprimas deziron iĝi sekcioj de TEJO. Ĉiu partoprenanta organizo plenumos difinitajn taskojn kiuj rilatas al unu aŭ pluraj el la jenaj kampoj: interna disvolviĝo, rilatoj kun TEJO kaj Esperantujo, kaj informado kaj varbado. Aldone, ĉiu konkursano devos dokumenti sian progreson kolektante pruvilojn pri sukcesa plenumo de taskoj kaj verkante raporton pri siaj atingoj fine de la konkursa periodo. La entuta kvanto da taskoj plenumendaj dependas de la kategorio de la konkursano:

KATEGORIO A. Granda aŭ aktiva landa/faka organizo.

KATEGORIO B. Disvolviĝanta junulara sekcio.

La konkursa periodo daŭros ekde la 1-a ĝis la 31-a de julio 2023. La gajnintoj estos anoncigitaj kaj premiitaj dum la 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lignano Sabbiadoro. Gajninto ricevos atestilon kaj donaceton pretigitajn de LFA. Gajnintoj elektitaj de la LFA-Komisiono ankaŭ estos intervjuitaj kaj iliaj atingoj kaj rakontoj publikigitaj en la kanaloj de TEJO. La organiza teamo, kiu kontrolas la plenumon de taskoj kaj ties dokumentadon, konsistas el: Patricio Agustín Iglesias kaj Manu Guaroa. Demandojn kaj komunikojn sendu al [lfa@tejo.org](mailto:lfa@tejo.org).

## Enmigrado sub la lupeo en UK Torino

En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia – ĉu por trovi lokon por kultivi teron kaj nutri sian familion, ĉu – en la nuntempo – por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj kiuj renkontas la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivi en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole – pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superis cent milionojn, laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR. La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa temo – en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industriaj produktoj. Nuntempe vi renkontas multajn migrantojn el diversaj kontinentoj en la stratoj de Torino. Ni invitas la kongresanojn al ok sesioj kun prelegoj kaj diskutoj pri la Kongresa temo.

Laŭ teksto de Thomas Bormann por la Kongresa Libro

## Elekt-jaro en UEA

En la 29-a de julio okazos elektoj de komitatanoj C, Estraranoj, Elekta Komisiono, Honoraj Membroj kaj pliaj. Okazos ankaŭ diskuto kaj decido pri la Estrara Raporto 2022.

## Kulturo kaj Esperanto: la forumo

La forumo estis dissendita de la ĉina radio, kunlabore kun ILEI, kies prezidanto, Ahmad Mamduhi, prezentis inde la instruistan ligan.

<https://www.facebook.com/608622747951605/videos/816546079676408>

## Oficiala instruado en Ganao

'Ni finfine obtenis oficialan aprobon por enkonduki Esperanto en kvin lernejoj en la ĉefurbo Akrao. Danke al direktorino kiun mi renkontis kaj priraportis antaŭe. Mi kaj miaj teamoj vizitos unuopajn lernejojn por havi klarajn planojn kun la respektivaj lernejestroj. Ricevita estas anglalingva oficiala letero deklaranta la rajtigojn. Tio estas grava oportuno por ni en Ganao.

Alfredo Kobina



## Uzbekio ĉe vojkruciĝo

La Silka Vojo, tra kiu fluis ne nur varoj, sed ankaŭ kulturoj, ideoj, komprenoj pri la mondo, estis dum jarmiloj vojo de renkontiĝoj kaj ankaŭ de kunlaboro kaj de paco. Tra ĝi Marko Polo atingis Pekinon kaj ĉinaj, mongolaj kaj uzbekaj varoj kaj ideoj atingis Venecion, alivorte la Okcidenton.

Zamenhof, kiam li kreis Esperanton, elpensis krei novan spiritan silkan vojon por unuigi la homaron, kaj en ĉi tiu "nia murd-epoko" ni vere bezonas la vojon de Esperanto al sincera dialogo inter ĉiuj popoloj por atingi justan pacon. Pro tio estas tre salutinda la nova libro "La pordo de la feliĉo", kiu ĵus aperis en Uzbekio fare de Gafur Mirzo, la restariganto de la uzbeka Esperanto-movado. Ĝi estos aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. Por informoj pri la libro kaj por mendoj antaŭ la Universala Kongreso, bonvolu kontakti Gafur Mirzo <gafurmirzo@mail.ru>.

## Tanzanio varbegas por sia UK

John Magessa el Tanzanio vizitis Parizon, survoje al Roterdamo. Kun muzika akompano, la vidbendo montras la meritojn de Tanzanio.

<https://www.youtube.com/watch?v=2jyU0thGGAs>

Sendis François Lo Jacomo.

===== 1337 vortoj =====

La kolekto de EKO legeblas kaj elŝuteblas ĉe:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 40).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>:.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.